




tejo
tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

Reprezentado de TEJO ĉe Junulara Forumo de Unesko



**Esperantista
vojaĝo
en Ĉeĥio**

**Eseo pri
vortfarado
en Esperanto**

**Recenzo de
dua albumo
de Kore**



Verŝajne vi iom surpriziĝas pri la longa eseo pri *Esperanta vortfarado*, kiu aperas en ĉi tiu numero. Fakte mi origine volis verki nur recenzon de la libro “*La bona lingvo*” de Claude PIRON, sed poste mi decidis ankaŭ trakti la respondan es-eon “*La mava lingvo*”

de Jorge CAMACHO, kaj finfine mia “recenzo” iĝis plena eseo pri la diskuto inter skemistoj (kiuj emas pli multe uzi vortfaradon per kunmetaĵoj kaj afiksoj) kaj ŝatantoj de novradikoj (“neologismoj”). Mi esperas ke iuj plene legos ĝin malgraŭ ĝia longeco; nu, laŭ mi indas :-)

Krome atendas vin interesa raporto el la Junulara Forumo de UNESKO, ĉe kiu partoprenis du reprezentantoj de TEJO. Dum la forumo ankaŭ estiĝis lingvaj problemoj ... nu, legu mem!

Ankaŭ aperas vera recenzo en ĉi tiu numero: Mia edzino recenzis la duan albumon de Kore, Tielas vivo. Aldone rusia TEJO-membrino raportas pri sia partopreno en lingva kurso de la hispana en Hispanio, kaj aperas raporto de vojaĝo de junaj Esperantistoj el Ĉeĥio kaj Slovakio al Ukrainio.

Mi deziras al vi agrablan legadon!
Marcos

Ne forgesu rekotizi!

Jes, jam alvenis la tempo por remembrigi en TEJO (aŭ re-patroniĝi) por 2008. Bonvolu frue rekotizi por ke via ricevado de *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde* ne estu interrompita. Ne forgesu ke, krom ricevado de la interesaj kaj informplenaj TEJO-revuoj, via membreco rajtigas vin ricevi rabaton je la partoprenkotizo de la IJK (kiu en 2008 okazos en Hungario)! Memoru, TEJO estas via asocio – helpu ankaŭ vi ke ĝi estu forta kaj aktiva en 2008! Kontaktu la Centran Oficejon, aŭ alĝu rete ĉe: www.uea.org/alighoj

Enhavo

Reprezentado de TEJO ĉe Junulara Forumo de UNESKO	3-4
Raporto pri la Oranĝa Renkontiĝo	4
Vojaĝo al Ukrainio	5-7
El-interna kaj el-ekstera vortprovizo – pensoj pri “la bona lingvo”	8-17
Kurso de la hispana lingvo kaj kulturo en Hispanio	17-19
Recenzo de “Tielas vivo” de Kore	19-20
Du albumoj de Persone senkoste elŝuteblaj	20

Limdato por 2008:2 – 15-a de marto 2008!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Nürnberger Straße 27a, 04103 Leipzig, Germanio. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton. Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanio/Britio). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Reprezentado de TEJO ĉe Junulara Forumo de UNESKO

De la 12a ĝis la 13a de oktobro okazis la 5a Junulara Forumo de UNESKO en Parizo. La *UNESCO Youth Forum* okazis la 5an fojon antaŭ la (dujara) ĝenerala asembleo de UNESKO. Rajtas partopreni reprezentantoj de la membroŝtatoj de UNESKO kaj de kun ĝi oficiale rilatantaj NROj*. Por TEJO partoprenis Estelle LOISEAU kaj Gregor HINKER, partopreno ebligita per la klopodoj de UEA-UNESKO-rilatanto Aleks KADAR. Ni havis la statuson de „observantoj“, kiu permesis partopreni en la diskutoj kaj asembleo, sen rajti voĉdoni.

La temo estis 'Edukado kaj ekonomia evoluo' kaj 'Scienco kaj teknologio por daŭrigebla evoluo kaj la rolo de UNESKO'. La forumo daŭris 2 tagojn. La unua duona tago estis rezervita al solenaj, foje sinripetantaj kaj sensencaj paroladoj de UNESKO-oficiuloj kaj al la elektado de prezidantino kaj raportanto de la asembleo.

La efektiva laboro okazis dum la dua kaj tria duontago. Dum la kvara duontago antaŭviditis diskuto kaj (pozitiva) voĉdonado pri la fina raporto; la dua ne okazis (vidu sube detale).

Kontribuoj

En la diskutoj pri „Edukado kaj ekonomia evoluo“ ni koncentriĝis en niaj kontribuoj kaj argumentoj je la aspektoj

- interkultura lernado
 - neformala edukado / volontulado / individuaj spertoj en neformalaj retoj
- kaj „flanke“ emfazis la gravan subtenan rolon de Esperanto en tiuj aspektoj. En la diskutoj pri „scienco kaj teknologio por daŭrigebla evoluo“ ni insistis je la rolo de edukado pri etikaj aspektoj en scienca/inĝeniera edukado.

Informado

Ni informis pri Esperanto kaj la aktivecoj de TEJO per informbudo, de kie ni disdonis varbilojn kaj helpe de komputilo prezentis na lernu.net, Pasporta Servon kaj praktikajn lingvajn ekzemplojn (Reta Vortaro).



Lingva fiasko

Tre interesa, kvankam malĝoja, estas ke la forumo fiaskis dum la lasta posttagmezo: laŭ la agendo la asembleo devus pridiskuti la finan dokumenton kaj poste pri ĝi voĉdoni; la prezidantino de la asembleo per tiu votumo povus prezenti la rezolucion al la ĝenerala asembleo de UNESKO. La proceduro antaŭvidis ke teamo de raportistoj konkludu el la raporto de ĉiuj grupoj la proponan rezolucion, kiu pro tempopremo estis nur anglalingva. Tiu fakto dum la kunsido de la asembleo semis pli kaj pli da ĉagreno kaj maltrankvileco inter la partoprenantoj malkapablaj legi la anglan, kiuj devis per la traduko sekvi la diskuton kaj ne povis sence havi partopreni en la diskuto pri vortumado, ideo aŭ ideologie gravaj detaloj (kiel ekz. la demando laŭ kiuj kriterioj homoj havu la rajton sekvi universitatan edukon: ĉu „laŭ kapabloj“, „laŭ bezonoj“, „laŭ intelektaj kapabloj“?).

Konsekvence, la diskuto iĝis pli kaj pli longa, emocia kaj neracia, kaj kvankam estis konsento pri la ĝeneralaj tezoj de la raporto, aldoniĝis al la sento de iu (lingva) diskriminacio (precipe perceptita de reprezentantoj de sudamerikaj landoj) la ĉagreno pri la tempopremo de la organizantoj, kiuj insistis je la fino de la asembleo je 19:00. La frusto de kelkaj partoprenantoj pri la lingva problemo klare montriĝis kiam kelkaj komencis paroli en la portugala, kiu ne estas oficiala UNESKO-lingvo.

La kunsido iĝis entute ĥaose je 19:00, kiam la tradukistoj ĉesis labori kaj forlasis la kabinojn, kaj la kunsido devis estis gvidata fare de la prezidantino kiu ne parolis la anglan. Post alia duona horo la laboristoj de la domo komencis malŝalti la lumon en la salono, kaj je 20:15 finfine tiuj, kiuj ankoraŭ restis (proksimume triono estis jam forinta) voĉdonis por la tiama versio de la rezolucio k taskigis la raportistan grupon kune kun la grupgvidantoj revizi la dokumenton ĝis la venontaga antaŭtagmezo. La NROj sukcesis eniri tiun revizan grupon. Intertempe la raporto publikigita rete:

unesdoc.unesco.org/images/0015/001540/154087e.pdf

Resuma opinio

Retrospektive, ni opinias ke la fiasko ĉefe radikas en la tro prema tempoplano kaj la maltro klara gvidado de la asembleo fare de la elektita prezidantino (la reprezentanto de Ekvatorio) kaj la Sekretariino (UNESKO-oficiulo); tamen, verŝajne laŭ la plimulto de la partoprenantoj la lingva problemo estis la kaŭzo de la malsukceso.

Malgraŭ la sufiĉe malamika fino, la forumo certe kontribuis al la kreado de retoj inter la partoprenantoj. Ni taksas ke je iu nivelo ni sukcesis vekti intereson pri Esperanto per niaj laborgrupaj kontribuoj, per la personaj informoj ĉe la informbudo kaj dum la

neformalaj programeroj.

Laŭ niaj spertoj plibonigebla por ontaj reprezentataj misioj

- Informpako: Estus praktike havi difinitan informpakon por tiaj celoj. Ĝi enhavu
- iun grandan afiŝon
- sufiĉe grandan kvanton de ĉefe anglalingva materialo pri TEJO kaj Esperanto por libere disdoni

- ĉirkaŭ po 10 ekzemplerojn de la DVD Esperanto Elektronike kaj de Kontakto por disdoni al individuoj

- kelkajn ekzemplerojn de Pasporta Servo kaj jarlibro

- Ĉiuj TEJO-representantoj ĉe tiaj eventoj havu personajn TEJO-vizitkartojn.

tejo.org havu almenaŭ bazan anglalingvan version...

Cetere: Ideo pri varbiloj, naskita el la debato: Flugfolio aŭ faldfolio, je la surfaca flanko en ekz-e la ses lingvoj oficialaj de UNESKO (araba, ĉina, rusa, franca, hispana, angla): „Are you fed up with translation?“ „La traduction – ras le bol ?“ ktp, je la alia flanko informoj pri Esperanto.

Gregor HINKER (Aŭstrujo)

Estelle LOISEAU (Francujo)

* NRO – Ne-Registara Organizo

Oranĝa Renkontiĝo

De la 21-a ĝis la 23-a de septembro okazis la Oranĝa Renkontiĝo en Hernusando (Härnösand), Svedio. La renkontiĝon organizis Hernusanda Esperantista Klubo kaj SEJU. Partoprenis 14 homoj el kvin landoj.

La renkontiĝon ornamis la aŭtunaj koloroj de la apuda arbaro. Arbara ekskurso estis unu el la programeroj; aliaj estis koncerto de La Perdita Generacio, piedpilkado, mond-

ĉampionado de bakio (novinventita ludo simila al ŝako), leciono pri la planlingvo *toki pona*, lingva gimnastiko, kaj diskuto pri la esperanta ideo. Multaj venis frue dum antaŭrenkontiĝo kaj restis poste dum postrenkontiĝo.

Magnus HENOCH (Svedujo)

Prezidanto de la Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo

Vojaĝo al Ukrainio

Grupo de sep esperantistoj el Ĉeĥio kaj Slovakio entreprenis somere dusemajnan Esperanto-vojaĝon al Ukrainio, vizitis Krimeon, Kievon kaj eĉ Ĉernobilon. Raportas kunvojaĝinto Mirek HRUŠKA.

Estis Silvestro 2006 kaj mi kun miaj du amikoj (Marek kaj Karol) el Ĉeĥio partoprenis neforgeseblan esperantan aranĝon "Ago-Semajno" en Pollando en Nowy Sącz. Dum la semajno ni konatiĝis kun Saša el Jalto en Ukrainio. Jam dum la aranĝo ni interkonsentiĝis kun ŝi, ke ni vizitos ŝin somere. Post la reveno komenciĝis malrapide planado de vojaĝo. Iom post iom aliĝis du niaj amikoj el Slovakio (Andrej kaj Juraj) kaj unu el Prago (Tomáš). La celo estis: Krimeon kaj post unu semajno trajne en Kievon.

La tago de forveturo estis fiksita je la 22-a de junio je la deka horo el Brno. Por ke nia vojaĝo estu senproblema, ni elserĉis en Interreto ĉion gravan. Paŭlo el Snina (orienta Slovakio), kiu ankaŭ volis veturi kun ni, aĉetis persone malantaŭ la landlimo en Uĝorod biletojn por trajno veturanta en krimean Simferopolon.

Finfine venis la tago de forveturo. Je le deka horo kaj tridek minutoj ni forveturis per buso de Student Agency el Brno en Košice. La vojaĝo estis trankvila kaj agrabla, sed bedaŭrinde, la buso malfruiĝis. La malfruiĝon ni jam ne sukcesis likvidi, male ĝi ankoraŭ kreskis ĉe la ĉeĥa-slovaka landlimo. En Košice ni devis esti je la dekoka horo - ne okazis, do ni ne povis enbusiĝi je la dekoka horo kaj dudek minutoj al limzona vilaĝo. Andrej kaj Juraj ne havis tiun problemon, ĉar ili veturis al Uĝorod sendepende de ni.

Por solvi nian problemon, Karol telefone vokis sian kuzon el Košice, kun kiu li interkonsentiĝis, ke li venos je la dudekunua horo al Košice kaj ke li iros kun ni al Uĝorod. Je la naŭa horo vespere ni enaŭtigis niajn dorsosakojn kaj ni ekvojaĝis trans Michalovce al la landlimo. Intertempe ni ricevis poŝmesaĝon

(SMS) de Andrej kaj Juraj, ke ili devis petveturi trans la limo, ĉar ili ne povis iri piede (ne estis al ili permesite transiri la landlimon piede), sed ili jam estas en Ukrainio.

Slovakaj doganistoj ne kontrolis nin longe kaj la formalaj pasis rapide. Sed laŭ kvanto de aŭtoj antaŭ la ukraina doganejo kaj ilia ŝoviĝado iom-post-iom ni antaŭsentis, ke ni devos longe atendi. Kaj konsidere, ke nia trajno foriris je la unua horo kaj tridek minutoj de nia tempo, ni jam ne havis sufiĉe da tempo, ke ni pacience atendu, ĝis venos nia vico. Do, Marek, Karol kaj la kuzo iris al doganistoj kaj post iom longa klarigo ili finfine tamen venis al la aŭto, ĉar ili elpetis prioritatan alvenon al kontrolo. Ni ricevis kartetojn por emmigrontoj kaj ni rapide plenigis ilin. Post respondo de rutina demando pri alkoholo kaj drogoj (kiu tirus tion en Ukrainion?) ni jam povis rapide kaj frue ricevi pasportojn kaj veturi plu! Sed tempo mallongiĝas...

En Ukrainio

Ĉar neniu el ni orientiĝas en Uĝorod kaj laŭ origine proponita pieda vojaĝo estas malsencoplena trovi la trajnstacion, ni jam rande de la urbo ŝanĝiĝas al la plej proksima taksio kaj rapide dum pluvo ni transkargas niajn dorsosakojn. Tio okazis tiel rapide, ke ni eĉ ne sukcesis diri adiaŭ al la kuzo de Karol! La taksioŝoforo bone konis la vojon, do li veturigis nin al trajnstacio rapide kaj senprobleme. Ni pagas en transkalkulo 80 kronojn kaj tuj kuras al perono. Tie ni jam renkontiĝas ĝoje kun Andrej kaj Juraj antaŭ nia trajno sur la unua trako kaj senprokraste ni enrajniĝas! Ni kaptis la trajnon!

Je la unua horo kaj tridek minutoj ni foveturas al Lvov kaj Simferopol. En kupeo ni estas dividitaj po duope - kuŝejoj en supra parto - kaj sub ni veturas fremdaj homoj. Mi kun Tomáš ne atendis ilin tiel frue dum nokto, sed tamen Marek devis veki nin, ke ni malŝlosu nian kupeon. La dorsosakojn ni kuŝigis

en spacon super la koridoro kaj ni finfine povas malrapide ekdormi. Ĝi estas stranga impresoj.

Post mallonga dormo, je la oka horo ni alvenas en Lvov, kie ni decidis profiti la ŝancon al mallonga esplora promeno kaj ŝanĝo de kunportitaj usonaj dolaroj al ukrainaj hriwnoj. Unue ni vizitis lokan katolikan preĝejon, sekve bazaron, kie ni aĉetis akvon kaj panon. Ŝajnas, ke Ĉeĥoj ne vizitas Lvov ofte, do dank' al tio ni antaŭnescie povis senpage veturi per tramo, kiu reklamas bieron de Lvov. La dorsosakojn ni lasis en la trajno (sed ili estis garditaj).

Estis dekkvara horo posttagmeze, kiam nia trajno kompreneble kun ni ekveturis. Dum longa, sume tridekokhora vojaĝo ni dufoje matenmanĝis teon kaj keksojn "Artek" kaj iris dufoje en manĝvagonon preni ĉeĥan bieron Staropramen kaj ankaŭ tagmanĝi veran barĉon*.

Krimeo

Estas dimanĉo, dekkvina horo kaj finfine nia trajno venis en Simferopolon, ĉefan urbon de Krimeo, de kie veturas trolebusoj en Jaltan - ĉi tiu linio havas mezuron de okdek kilometroj (la plej longa linio en mondo) kaj tie veturas trolebusoj de Škoda ekipitaj por somero per kurtenoj - ni sentas, ke ĝi estas preskaŭ devo provi ĉi tiun mondan unikajon.

La vojaĝo per tiu trolebuso ne estas tamen neniel kapturita, ni elbusiĝis en haltejo en Massandra post la sesa horo vespere. Ĉe la haltejo jam atendis Saša kaj kun ŝi du pliaj esperantistoj, Magnus el Svedio kaj Aron el Hungario. Bonvenigado preskaŭ ne finiĝas - tiom feliĉaj ni estas, ke nia vojaĝo jam estas post ni. Kaj post longa tempo (ses monatoj) ni denove vidas niajn geamikojn. Poste ni jam iras en tranoktejon. La ĉambroj ne aspektas bonege, sed grava estas, ke ni povas dormi ie :)

Vespere ni renkontiĝas kun verŝajne la plej grava esperantisto en Jalto, Jefim. Kvankam li estas jam ne juna, li estas tre aktiva. Iomete ni konatiĝis kun Jalto, tradicia somerrestadejo de Rusoj (cetere oni parolas pli ruse ol ukraine en Krimeo).

Se mi devus retrorigardi post nia semajna



restado en Krimeo, ni vizits Baĥĉisaraj, Ĉufutkale, Levadian palacon de fama jalta konferenco kaj Hirundan neston, ni partoprenis montaran ekskurson, kelkfoje ni naĝis en maro, konatiĝis kun pliaj lokaj esperantistoj...-programo estis vere riĉa, sed tamen ni devis kelkajn niajn planojn prokrasti por ia sekva tempo (eble iam venontfoje).

Dimanĉe, tuŝproksime antaŭ definitiva disiro kun Krimeo, ni alveturis en ĉeĥan vilaĝon Bohemka - Lobanovo, proksime al Dĵankoj. La renkontiĝo estis tre riĉiga, fruktodona, ĉar ni estis de lokaj homoj varme bonvenigitaj kaj ni povis trarigardi la libron "Ĉeĥoj en Krimeo", sed eĉ ĉeĥan lernejan klasĉambron, lokan muzeeton kaj tombejon, kaj tiel ni inter tiuj ĉeĥaj vortoj kaj nomoj sentis nin preskaŭ kiel en Ĉeĥio - kvankam la loĝantoj de Bohemka kaj iliaj familioj loĝas en ĉi tiu vilaĝo pli ol 140 jarojn (fakte, Bohemka estis sola vilaĝo, kie ni estis).

Vespere ni revenis en Dĵankoj kaj de tie ni daŭrigis la vojaĝon al Kiev, la ĉefa urbo de Ukrainio. Tiam ni elektis, ke ni ne veturos en kupeoj, sed ke ni provos por Ukrainio pli tipan veturmanieron "plackartnyj", kiu tamen ne estas tiel sekura kaj ne estas privata. Sed estis kun ni Saša kaj Magnus, sekve ke ni okupis du apartejojn kaj neniu priŝtelis nin.

En Kievo

Estis lundo, dekkvara horo posttagmeze, kiam ni alvenis en Kievo. Ni decidis aĉeti por nia certeco biletojn por revena vojaĝo en Uĝorod kaj bonŝance estis kupeoj ankoraŭ liberaj. Dum la atendado en vico, aperis ankaŭ Jirka, kiu al ni venis per buso el Brno. Ĉiuj komune veturis per metroo al lokaj esperantistoj. Ĉe unuj el ili ni poste interkonsentis, kiu loĝos ĉe kiu kun kiu, sed ankaŭ kiu havas intereson pri la ekskurso al Ĉernobilo. Fine ni estis ses.

Laŭ konsento poste Karol, Magnus kaj Saŝa tranoktis ĉe juna esperantistino Nataŝa en Kievo kaj ni ses ceteraj en proksima vilaĝo Lebedivka ĉe gepatroj de ŝia amikino Oksana (ni konis ambaŭ du el Ago-Semajno). Kun Oksana ni renkontiĝis ĉe la stacio Arzenalna kaj poste per metroo ni alveturis al finstacio "Geroiv Dnipro" - Herooj de Dnepro, de kie forveturis buso en Lebedivka. Tie atendis nin afabla bonveno kaj tre bongusta vespermanĝo surtabligita en ĝardeno. Poste ni iris al proksima kieva baseno.

Bedaŭrinde ni ne havis tiom da tempo por Kievo, sed tamen ĉion, kion ni volis vidi, ni fine vidis: Ĥreŝatik (la ĉefa strato), la placon de sendependeco, la Kievan kavan monaĥejon, templon de sankta Sofia kaj aliajn historiajn templojn, turisman strateton Andrijivskij Uzviz, Operejon, stadionon de Dynamo Kyiv ktp.

La pinto de nia restado estis ĵaŭdo la 5-a de julio, kiam ni veturis fari ekskurson al Ĉernobilo. Mi certe neniam forgesos tiun tagon - stari 100 metrojn antaŭ eksplodinta kvara reaktoro aŭ trairi en "urbo de spiritoj" Pripjat estas vere kruda kaj neforgesebla sperto. Karol kaj Saŝa ĉion fotis :)

Kaj denove hejmen

Do dimanĉe jam okazis tio, kio iam devis esti: forveturo. Estis vere interesegaj du semajnoj en Ukrainio, sed tamen jam estis tempo reveni hejmen. La adiaŭo tamen estis relative gaja kaj fine ni ĉiuj Ĉeĥoj kaj Slovakoj tre kontentaj je la dua horo kaj tridek minutoj posttagmeze forveturis al Uĝorod.

Kiel vespermanĝo mi ricevis kun Juraj

salamon de niaj kunveturantoj (avino, patrino kaj kvarjara filo Valerĉik - ni relative sukcesis babili kun ili). Panon ni jam havis. Vespere mi mallonge babilis kun Ukrainano, kiu min hazarde vidis antaŭ metroo laŭ mia dorsosako...

Sabato, la 7-a de julio, la sepa horo kaj tridek minutoj kaj ni ĵus eltrajniĝis. Ni tuj iras al busstacio por ekscii informojn pri buso al Slovakio. La provo, lastfoje voki al Saŝa senpage – dank' al poŝtelefona servo "life:)", kies SIM-karto ebligis al ni dum nia restado en Ukrainio malmultekostan vokadon al Ĉeĥio kaj eĉ senpagan telefonadon en reto de "life:)" - bedaŭrinde jam ne sukcesis.

Ni pagis komune por buso kaj je la oka horo ni forveturis per buso al Koŝice (ni ne povis rigardi la urbon). La landlima kontrolo estis pli trankvila ol antaŭ du semajnoj. La ŝoforo sakris pri motoro, sed dank' al dio, ni sukcesis trapasi la kontrolon kaj ni povis daŭre veturi en Koŝice. En Koŝice estis komplikaĵoj kun nia bileto, kiu falis surteren dum elbusiĝado, kaj ĉar la ŝoforo ne ricevis ĝin, li komence ne volis doni al ni niajn dorsosakojn. Sed bonŝance ni fine trovis la bileton.

Juraj kaj Andrej enbusiĝis en Koŝice direkte al Bratislava. Karol laŭ plano restis en Koŝice ĉe sia kuzo. Origine ni volis veturi per trajno trans Slovakio, sed fine ni rapide decidis veturi kun Juraj kaj Andrej per la sama buso. Bedaŭrinde la buso estis plene multekosta. Dum la okhora vojaĝo en Bratislava ni havis tridek-minutan ripozon. Juraj kaj Andrej dume elbusiĝis kaj ni sen problemoj alvenis en Bratislava, kvankam Marek ne estis tre feliĉa pri tiu ideo. Sed por mi kaj Tomáš tiu buso estis tre bona. Post la sepa horo foveveturis buso de Student Agency al Prago, sed ĝi estis plena kaj ni ne enbusiĝis. Sed post dekkvin minutoj ni forveturis per ĉeĥa buso al Brno. Mi skribis al miaj gepatroj, kiam ni alvenos en Brno. Marek kaj Jirka veturis per trajno al Uherské Hradiště. Bedaŭrinde tiu pli frua alveturo en Brno ne helpis al Tomáš, li al Prago veturis per la sama meznokta trajno kiel laŭ la origina plano.

Mirek HRUŠKA, Ĉeĥio

*Barĉo – ukraina supo el betoj

El-interna kaj el-ekstera vortprovizo – pensoj pri "la bona lingvo"

Ĉu vi diras "malliberejo" aŭ "prizono"? Ĉu vi foje uzas vortojn kiel "kurta" kaj "lanta" anstataŭ "mallonga" kaj "malrapida", aŭ ĉu vi malŝatas tiajn vortojn? Ĉu vi iam rimarkis, ke la vorto "teologo" povas pensigi pri fakulo pri teoj anstataŭ pri religi-fakulo? Pri tiu temaro jam okazis multaj diskutoj en Esperantujo. En ĉi tiu eseo mi kritike analizas la nunan staton de la diskuto, precipe per analizo de la libro

"La bona lingvo" de Claude PIRON kaj la eseo "La mava lingvo" de Jorge CAMACHO.

La bona lingvo

La bona lingvo estas verko de Claude PIRON aperinta en 1989, kun dua eldono el 1997 (kiam mi citas el ĝi, mi mencias la paĝonombrojn de la dua eldono). PIRON mem prezentas ĝin kiel ĉefe subjektivan verkon, en

Terminaro

Por bone kompreni ĉi tiun eseon, oni devas koni kelkajn esprimojn, kiuj ofte uziĝas en ĉi tiu kunteksto:

- **Fundamento** estas ofta mallongigo por "Fundamento de Esperanto", verko publikigita de Zamenhof en 1905 por priskribi la neŝanĝeblan bazon de la lingvo. Ĝi estis oficiale akceptita dum la unua Universala Kongreso samjare. En la **15-a regulo** de la Fundamento, estis skribite ke "la tiel nomataj vortoj "fremdaj", t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fremda fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion kaj la gramatikajn finiĝojn de tiu ĉi lingvo". Aldone, la antaŭparolo de la Fundamento mencias la eblecon enkonduki novajn vortojn en la oficialan vortaron per "Aldono al la Fundamento" – sed nur se la novaj vortoj jam estas "tute maturaj". La Akademio de Esperanto (aŭ antaŭe la Lingva Komitato) jam realigis ĝis nun naŭ tiajn **Oficialajn Aldonojn**. Vorto estas **Fundamenta**, se ĝi aperas en la Fundamento, kaj **oficiala**, se ĝi aperas en la Fundamento aŭ en Oficiala Aldono

- **Neologismo** – ĉi tiu vorto havas iomete alian signifon, kiam oni parolas pri Esperanto ol kiam oni parolas pri aliaj lingvoj. Rilate al Esperanto oni kutime nur uzas ĝin por novaj radikoj (dum rilate al aliaj lingvoj, ĝi ankaŭ povas esti uzata por novaj kunmetaĵoj el jam ekzistantaj elementoj) – por eviti tiun dusignifecon mi uzos la vorton **novradiko** anstataŭe (dum parolante pri aliaj lingvoj, mi uzos **novvorto**). Oni kutime uzas la vorton **neologismo** (aŭ **novradiko**) por ĉiu radiko ne-Fundamenta aŭ ne oficiale aldonita, eĉ se la vorto jam ne plu estas tiel nova.

- Kiam oni transprenas vorton el alia lingvo, tio estas **el-ekstera** vortfarado; se oni uzas jam ekzistantajn radikojn kaj afiksojn por krei novan vorton, tio estas **el-interna** vortfarado.

- La prefero al el-interna vortfarado nomiĝas **skemismo** aŭ **simplismo**. Pro la verko "La bona lingvo" de Claude PIRON, en kiu li argumentas por prefero de el-interna al el-ekstera vortfarado, oni foje uzas la esprimon **bona lingvo** por skemisma lingvaĵo. La emo al el-ekstera vortfarado foje nomiĝas **naturalismo**, sed laŭ PIRON tiu termino evitindas, ĉar fakte la el-interna vortfarado estas pli "natura" por la homa psiko (kiel montras la lingvouzo de infanoj aŭ plenkreskaj lernantoj de iu ajn lingvo).

kiu li pledas por pli multa uzo de la vortfaraj eblecoj de Esperanto anstataŭ vaste uzi novradikojn. Sed kvankam en la libro certe ĉefrolas la subjektiva vidpunkto de PIRON, li tamen prezentas multajn objektivajn argumentojn por sia vidpunkto. Kiel kutime ĉe PIRON, la verko klarigas multajn aferojn el psikologia vidpunkto. En ĉi tiu eseo, mi ĉefe koncentriĝos pri liaj objektivaj argumentoj ne-psikologiaj.

PIRON argumentas, ke la reale uzata Esperanto riĉas dum en ĝi superregas el-interna vortfarado. Li pravas tion per ekzemploj de kunmetaĵoj, kiuj estis reale uzataj en parola Esperanto: *malprotekti*, *pratimo*, *muzeema*, *alprelegotoj* (paĝoj 17-19). Li laŭdas la Zamenhofan ideon malgrandigi la kvanton de lernendaj radikoj per la uzo de er-kombinado. Por li, la el-ekstera vortfarado estas rezisto al tiu granda ŝanĝo, kiun alportis tiu Zamenhofa ideo (paĝoj 67-68).

PIRON kritikas ke la el-ekstera vortfarado ĉefe malfaciligas Esperanton por ne-Eŭropanoj, dum Eŭropanoj (precipe la pli kleraj Eŭropanoj) povas kompreni la plej multajn novradikojn senprobleme; lia ekzemplo estas tiu de la fama japana esperantisto Kiotaro DEGUĈI, kiu junaĝe ĉeestis UK-on en Sofio, kaj konstatis ke la tro multaj eŭropdevenaj fakterminoj baras lian komprenon de la prelegoj. PIRON mencias vortojn kiel *aŭtoktono*, *pediatro* kaj *eŭfonie*, kiujn multaj eŭropanoj povas kompreni senprobleme, dum por ĉinoj kaj japanoj ili estas misteroj, kiuj baras la komprenon ĝis kiam ili rigardas vortaron. Laŭ li, la uzo de la alternativoj *praloĝanto*, *infankuracisto* kaj *belsone* demokratiigas la rilaton inter anoj de diversaj popoloj (paĝo 82).

La mava lingvo

En 1999 aperis la eseo "La mava lingvo:

neologismoj kaj malneologismoj en Esperanto" de Jorge CAMACHO,¹ kiu estas kritika respondo al la libro de PIRON. CAMACHO unue montras, ke "la realo estas iom malpli simpla"² ol ĝin bildigas PIRON, ĉar multaj radikoj, kiujn oni konsideras aŭ konsideris novradikojn, jam eniris la realan lingvo-uzon. Kiel ekzemplojn li donas vortojn, kiuj aperis en listo de novradikoj en la Parnasa Gvidlibro de 1932, sed kiuj intertempe iĝis komun-uzaj: *eseo*, *kiosko*, *mesaĝo*, *tajpi*, *fiki*, *bebo* ktp. (Tamen en lia listo de intertempe "komun-uzaj" vortoj ankaŭ troviĝas kelkaj, kiuj kvankam foje renkonteblaj, ne vere estas komun-uzaj, ekz-e *mitingo* kaj *dista*.)

Laŭ CAMACHO la vera problemo estas tiuj parolantoj kiuj ne flegas aŭ eĉ mistraktas Esperanton. Li plendas pri la malgusta lingvo-uzo de "vortar-fobiuloj"; liaj ekzemploj estas uzo de *frimasono* anstataŭ *framasono* kaj de *oktopuso* kaj *oktopodo* anstataŭ *polpo*.

Aldone, ĝenas lin la manko de ekvivalentoj en Esperanto por konceptoj klare formeblaj alilingve. Li tamen donas laŭ mi tre malbonan ekzemplon por tiu manko: Li mencias la anglan vorton "boyfriend", por kiu li enkondukis la novradikon "umiko" – tute nenecesan, ĉar almenaŭ en la junulara lingvouzo (kie tiu koncepto plej ofte estas bezonata), tute enradikiĝis la uzo de la kunmetaĵo "koramiko" en tiu senco. Li nomas tiun kunmetaĵon "inĝenieraĵo" – laŭ mi ĝi estas normala, facile komprenebla kunmetaĵo, kiu alprenis fiksitajn signifon (same kiel "lernejo" alprenis fiksitajn signifon kaj ne estas iu ajn loko de lernado). Ankaŭ la fakto, ke iam iuj uzis tiun kunmetaĵon en la senco "tre bona amiko" tute ne ĝenas ĝiajn nunajn uzantojn.

En la sama eseo, CAMACHO ankaŭ argumentas en maniero, kiu fakte subtenas la ideojn de PIRON: Ekz-e, li kritikas ke al vorto kiel *malbona* mankas forto, kaj tial necesas uzi vortojn kiel *malbonega*, *terura*, *aĉa*, *fuŝa*,

¹ La eseo origine aperis en la esearo "Lingva Arto" – la paĝonombroj indikas la paĝojn en tiu libro. Nun la eseo ankaŭ haveblas interrete: jorgecice.blogspot.com/2001/01/la-mava-lingvo-neologismoj-kaj.html

² paĝo 31 (de Lingva Arto, mallongigota kiel LA)

vomiga, naŭza, merda kaj *putra*. Certe al PIRON plaĉus ĉiuj ĉi vortoj krom *merda*, ĉar ili montras kiom da nuancoj kaj emocioj esprimeblas per la rimedoj de la reala lingvouzo. Tuj poste CAMACHO mencias "neologismojn" kiel *malnokto, malkruda, kapi* kaj *lipi*. Tiuj estas novvortoj sen esti novradikoj – ĝuste laŭ la plaĉo de PIRON kaj aliaj skemistoj.

Fine de la eseo CAMACHO defendas sian propran grandskalan uzon de novradikoj per la argumento ke li celas altkvalitan komunikadon, "lingvon riĉan, esprimivan, kapablan je precizo kaj je preciozo, je koloroj kaj nuancoj". Sed la fakto, ke li implice akceptas la supozon ke pli granda kvanto da novradikoj donas pli da esprim-riĉeco, nuancoj kaj precizo al la lingvo, ŝajnas montri ke li ne tre atente legis la libron de PIRON, aŭ almenaŭ igas onin konkludi ke lia eseo estas tute nekontentiga respondo al *La bona lingvo*.

PIRON ekz-e skribas, ke en Esperanto ofte eblas precizi pli ol en aliaj lingvoj. Tiel la franca vorto *condicile* tradukeblas en Esperanton per samklasano, samlernejano, kunstudanto, kunlernanto, studokunulo ktp. Li aldonas, ke ankaŭ malprecizeco, se ĝi kunekestas kun precizeco, estas io riĉiga; li donas la ekzemplon de la vorto *skribilo*, por kiu ne ekzistas franca ekvivalento, ĉar la franca havas nur precizajn vortojn por la diversaj specoj de skribiloj. Ke Esperanto havas, aldone al la unuopaj vortoj por la specoj de skribiloj, ankaŭ la pli malprecizan vorton *skribilo* certe igas ĝin ĉi-rilate pli riĉa ol la franca.

Aldone, la kredo ke per novradiko oni povas arte esprimi iun nuancon estas iluzio, ĉar en arta verkado tre gravas la elvokado de emocioj. Pri tio PIRON skribas sur paĝo 98: "Por senti la harmoniojn de vorto, necesas, ke oni renkontu ĝin cent- aŭ almenaŭ kvindek-foje en diversaj situacioj kaj ĉirkaŭtekstoj. Legi la signifon el vortaro havigas al vi nenion el la

etoso de la radiko". Eĉ se nombro malpli alta ol kvindek povas sufiĉi, certe estas vero en ĉi tiu aserto. Kial CAMACHO tute ne respondas al ĉi tiu argumento?

Pri la Fundamento kaj oficialeco

Ĉar multaj el la radikoj, kiujn la skemistoj emas eviti, estas ne-oficialaj (do nek Fundamentaj nek oficiale aldonitaj), oni foje egaligas la skemismon al la emo eviti ĉiujn ne-oficialajn (aŭ eĉ ĉiujn ne-Fundamentajn) radikojn. Certe estas iuj skemistoj, kiuj emas tiel limigi sian vortprovizon. Sed oni ne egaligu tiun oficial-vortismon aŭ Fundament-vortismon al la skemismo, ĉar temas pri apartaj ismoj, kiuj nur foje koincidas: La fama skemisto Renato Corsetti ekz-e kritikas la unuan Oficialan Aldonon, en kiu oficialiĝis vortoj kiel *antipatio* (=malsimpatio) kaj *anonima* (=sennoma).³ PIRON mem mencias sian preferon de la ne-oficiala *spontana* al la oficiala *spontanea*. Kaj ne temas nur pri oficiale aldonitaj vortoj, sed eĉ pri Fundamentaj vortoj: Ekz-e, PIRON kritikas la vorton *redaktoro*,⁴ kiu anstataŭigeblas per *redaktanto* aŭ *redaktisto*. Aldone skemistoj certe konscias ke estas multaj uzindaj vortoj (ĉefe fakvortoj) kiuj estas ne-oficialaj, ekz-e *ronroni* (=murmuri kiel kontenta kato), la matematika esprimo *primo* kaj la birda specio *melopsitako* (se oni konsideras ne nur la ne-oficialajn, sed ĉiujn ne-Fundamentajn vortojn, aldoniĝas multe pli da uzindaj vortoj: *bildo*, *gorilo*, *dramo*, *bito* ktp).

(Kompreneble mi konscias pri tio, ke la plej multaj skemistoj interesiĝas pri Fundamenteco kaj oficialeco de vortoj, kaj preferas uzi oficialajn vortojn; sed tion ili faras ĉefe ĉar ili bezonas ian skafaldon, kiu kuntenas la lingvon. Se ili ne rigardus la Fundamenton, ili ekz-e povus konkludi, ke oni evitu la vorton "juna", ĉar ja eblas diri "malolda". Kutime sufiĉas kiel PIRON⁵ uzi la realan lingvouzon

³ En la eseo "La malbona lingvo: seksismo kaj aliaj ismoj en la okcidenta dialekto de Esperanto" trovebla ĉe tinyurl.com/2r7qfs

⁴ paĝo 79 (La bona lingvo, mallongigota kiel BL)

⁵ "En ĝi [la reale uzata Esperanto] kuŝas mia normo" – paĝo 14 (BL)

kiel normon, kaj la Fundamenteco kaj oficialeco povas iasence konsideriĝi nur anstataŭaj kriterioj, ĉar la reala lingvouzo estas pli malfacile kontrolebla ol oficialeco).

CAMACHO mem ankaŭ tiel tro-simpligis la vidpunkton de la skemistoj por pli facile ataki ĝin: Ekz-e li mencias la esprimojn "elokventa mesaĝo" kaj "embuska etoso",⁶ ĉe kiuj oni povas miri pri tio ke la A-vortoj (adjektivoj) estas Fundamentaj kaj la O-vortoj (substantivoj) ne. Sed la fakto, ke ekzistas ne-Fundamentaj vortoj pli kutimaj ol iuj Fundamentaj vortoj tute ne estas problemo por la skemistoj, ĉar ilia vidpunkto ja ne rilatas al Fundamenteco (aŭ oficialeco) de vortoj.

Ŝajne CAMACHO mem konscias pri tio, ke skemismo ne egalas al nur-Fundamentismo aŭ nur-oficialismo, ĉar li mem skribas: "La devizo de t.n. simplistoj efektive tre simplas: 'mi aprobas nur tiujn neologismojn, kiuj konvenas aŭ plaĉas al mi'". Sed simplistoj ja povas akcepti malkonsenton pri unuopaj radikoj; ilia devizo ne rilatas al unuopaj radikoj sed al ĝenerala principo eviti tute ne-necesajn radikojn kaj ne-troigi la enkondukon de novradikoj.

Grava distingo

Kaj PIRON kaj CAMACHO argumentas kontraŭ aŭ por novradikemo ĝenerale, sen aparte konsideri la malsamajn specojn de novradikoj, por kiuj oni bezonas tute malsamajn argumentojn. Mi tial dividos la diskuton en kvar partojn laŭ la specoj de novradikoj, kaj konsideros la argumentojn por kaj kontraŭ certa speco de novradikoj aparte:

- Fakaj/sciencaj/teknikaj novradikoj, ĉefe de grek-latina deveno, ekz-e *labialo* (=lipa konsonanto), *pediatro* (=infankuracisto), *pneŭmonito* (=pulm-inflamo), *aŭtodidakte* (mem-lerne); lastatempe ankaŭ de anglalingva deveno, ekz-e *softvaro* (=programaro), *blog* (=reta taglibro)

- Vortoj por nefakaj konceptoj, kiuj ne havas precizan unuvortan ekvivalenton en (sen-novradika) Esperanto, ekz-e *timida* (≈

timema, sinĝenema, malaplomba), *langvoro* (≈ malviglo, (dolĉa) melankolio, palo, senforteco)

- Tute samsignifaj anstataŭigoj/alternativoj al jam ekzistantaj vortoj; ĉefe temas pri la mal-mal-vortoj (ekz-e *frida*=malvarma, *poka*=malmulta), sed ankaŭ pri vortoj kiel *bagaĝo* (=pakaĵo) kaj *taŭro* (=virbovo)

- Frue enkondukitaj novradikoj, kiuj jam delonge tute enradikiĝis en la realan lingvouzon, ekz-e *mesaĝo*, *pluraj*, *humuro* kaj *baleto*

Fakaj/sciencaj/teknikaj novradikoj

Neniu povas dubi, ke foje necesas novaj radikoj por esprimi novajn teknologiaĵojn aŭ novajn fakajn konceptojn. Al ĉi tiu kampo apartenas la plej multaj Esperantaj novradikoj, kaj granda proporcio el ili vere estas necesa. Aliflanke ankaŭ aperis multaj ne-necesaj radikoj ĉi-kampe: *dermatologo* anstataŭ *haŭt-kuracisto*, *agro* anstataŭ *kampo*, *abdomeno* anstataŭ *ventro*, *hardvaro* anstataŭ *aparataro* ktp. Kutime tiuj vortoj jam ekzistas kiel fakaj esprimoj en pluraj eŭropaj lingvoj antaŭ ol eniri Esperanton. Tiuj, kiuj enkondukas ilin al Esperanto, argumentas ke tio estas laŭ-Fundamenta pro la 15-a regulo. La 15-a regulo tamen celas nur vortojn "kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fremda fonto" – ĝi ne asertas ke sufiĉas se la plimulto de la Eŭropaj lingvoj prenis ĝin el unu fonto, sed vere postulas, ke estu plimulto de ĉiuj lingvoj. Fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcento estis ankoraŭ tre kutime en la Okcidenta kultursfero ignori la ne-eŭropajn lingvojn – la Esperantistoj (ja tiam ĉefe Okcidentanoj) faris la samon kaj tial uzis la 15-an regulon por esperantigi vortojn kiujn la plej multaj eŭropaj lingvoj konas – sen konsidero de la ne-eŭropaj lingvoj. Ne farus multe da senco nun kritiki niajn pionirojn, kiuj ja vivis en tute alispeca socio, sed tamen oni kritiku tiujn, kiuj daŭre pensas tiel. Kiam oni konsideras ĉiujn lingvojn, eŭropajn kaj ne-eŭropajn, multaj fakvortoj de greklatina aŭ

⁶ paĝo 38 (LA)

anglalingva deveno ne aperas en la plimulto de la lingvoj, sed nur en malplimulto. Do oni tre atente uzu la 15-an regulon.

Sed kial la Okcidentaj (kaj kelkaj ne-Okcidentaj) lingvoj tiel emas al greklatinaj fakvortoj? Laŭ kelkaj lingvistoj, la avantaĝo de tiuj fakvortoj, kiuj baziĝas sur malnovgrekaj kaj latinaj elementoj estas ke ili staras meze inter arbitraj vortkreo kaj vortfarado per kunmetado.⁷ Ĉe kunmetitaj vortoj, ekzistas la risko de eraraj konkludoj pri la vortsignifo; ekz-e germanaj gramatik-istoj kritikas la kunmetitan vorton *Tatform* ("ago-formo") uzatan anstataŭ *Aktiv* (aktiva voĉo), ĉar verboj en aktiva voĉo ofte esprimas tute ne-agan signifon (ekz-e "suferas"). Kvankam la vorto *Aktiv* mem enhavas latinan radikon kun la signifo "agi", tio ne kaŭzas erarajn konkludojn ĉe la plej multaj germanoj, kiuj ja ne konas la precizan signifon de iu latina radiko.

Ĉu do pro la sama kialo ni ankaŭ preferu uzon de greklatinaj elementoj al Esperantaj elementoj en vortfarado? Laŭ mi certe ne, ĉar estas fundamenta diferenco inter Esperanto kaj tiuj Okcidentaj lingvoj: En Esperanto ekzistas jam multegaj tute enradikiĝintaj kunmetaĵoj, kies signifoj ne sekvas per pura logiko el la signifoj de la konsistaj elementoj. Ekz-e universitato ne estas lernejo, kvankam ĝi estas loko en kiu oni lernas. Kaj grupo de kvin arboj ne estas arbaro, kvankam ĝi ja estas aro de arboj. La signifoj de la vortoj *lernejo* kaj *arbaro* do ne sekvas per pura logiko el la signifoj de la elementoj *lern-*, *-ej-*, *arb-* kaj *-ar-*. La grava afero estas, ke la konsistaj elementoj ne donas difinon de la kunmetita vorto. Eĉ pli grave ol ĉe per-afiksa vortfarado, tio veras ĉe vortfarado per precizigaj antaŭelementoj: *orfiŝo* ne konsistas el oro, kaj iu fingro povas esti dika sen esti *dikfingro*. Certe ankaŭ en aliaj lingvoj ekzistas tiaj kunmetaĵoj, kiuj ne estas difineblaj per siaj konsistaj elementoj: Analoge al la Esperanta vorto *orfiŝo* ekzistas la samsignifa germana

vorto *Goldfisch* kaj la angla vorto *goldfish*. Sed tamen aliaj lingvoj (almenaŭ aliaj Okcidentaj lingvoj) havas multe malpli da tiaj kunmetaĵoj ol Esperanto. En tiuj lingvoj, oni emas kompreni novajn kunmetaĵojn el internaj lingvo-elementoj kvazaŭ tiuj elementoj difinas ilin. En Esperanto aliflanke dekomence regis la principo de vasta el-interna vortfarado; tial nature forestis tiu emo al difina kompreno. Konklude, tiu argumento por el-ekstera vortfarado en Okcidentaj lingvoj ne validas por Esperanto.

La problemo estas, ke la Okcidentaj Esperantistoj, kiuj enkondukas nenecesajn fakajn novradikojn ofte tute ne konscias pri tio, ke ili per tio malfaciligas Esperanton. Ili ne konscias pri la fakto, ke multaj ne-Okcidentaj lingvoj ne havas tiujn vortojn, kaj ke eĉ en kelkaj Okcidentaj lingvoj, ilin konas nur la plej kleraj homoj. Kiel skribis PIRON, "en la granda plimulta el la kazoj, la avantaĝo estas donita al tiuj, kiuj komprenas la latinan aŭ iun latinidan lingvon, plus tiujn grekajn radikojn, kiuj firmiĝis en la lingvaĵo de kleruloj okcident-eŭropaj".⁸ Kaj certe li pravas dirante ke "ju pli ni uzas vortojn ne formitajn el la baza radikaro, des pli ni aldonas monatojn kaj jarojn da lernado aŭ da lingva malkomforto al kunhomoj". Parolante pri la vorto *aŭtodidakte* (=memlerne, mem-instrue), li retorike demandas "Kial paroli greke, se eblas sin esprimi en Esperanto?", kaj prave asertas ke tio estas kontraŭa al la naskokialo de Esperanto.

Pri la pli nova emo preni multajn fakajn radikojn (precipe komputadajn) el la angla lingvo, oni povas diri preskaŭ la samajn aferojn, kiujn PIRON diris pri grek-latinaĵoj; kial uzi la novradikojn *softvaro* kaj *hardvaro*, se eblas sin esprimi pli klare per la kunmetaĵoj *programaro* kaj *aparataro*? (La fakto, ke PIRON mem nenion diris pri tiu anglalingva influo, verŝajne venas nur de tio, ke li verkis sian libron en 1989, kiam ankoraŭ estis multe

⁶ paĝo 38 (LA)

⁷ Kirsten Adamzik, *Sprache: Wege zum Verstehen*, paĝo 137

⁸ paĝo 81 (BL)

malpli da anglalingva influo sur la Esperantan vortprovizon.)

Ni revenu al la grek-latinaĵoj: PIRON ankaŭ atentigas pri aparta problemo de certaj grekaj elementoj kiel *teo-*, *mono-*, *homo-* kaj *neo-*, kiuj tute ne rilatas al teo, mono, homo kaj neo (neado), sed signifas *dio*, *unu*, *sama* kaj *nova*.⁹ Tio certe konfuzas ĉiujn lernantojn, sed aparte la aziajn kaj afrikajn lernantojn, kiuj ne parolas Eŭropan lingvon.

La nova PIV prezentas multajn el la grekaj elementoj kvazaŭ ili estus Esperantaj elementoj: ekz-e aperas apartaj kapvortoj por *oftalmo* (=okulo), *kardio* (=koro), la "sufikso" *-olog/* (por fakuloj) kaj la "prefikso" *pre-* (=antaŭ-). Sed tiuj elementoj ne estas Esperantaj elementoj: malsame al Esperantaj elementoj, oni ne povas libere kunligi ilin kun aliaj elementoj; ili estas nur uzataj en certaj fiksitaj "kunmetaĵoj", ĉe kiuj ĉiuj elementoj devas esti greklatinaĵoj. Mi ne kontraŭas al la fakto, ke PIV mencias tiujn grekajn elementojn; sed ĝi devus klare montri, ke ili ne estas libere uzeblaj Esperantaj elementoj. Menciante ilin en la sama maniero kiel Esperantaj elementojn, PIV ege konfuzas siajn legantojn.

PIV mem agnoskas, ke *biologo* ne estas analizebla. Sed kial ĝi ne mencias aparte la elementon *bio*, tiel ebligante analizon de *biografo*, *biometrio*, *biosfero* ktp? PIV do elektis kelkajn el la greke analizeblaj vortoj kaj metis ilin en la saman kategorion kiel la Esperante analizeblaj kunmetaĵoj, dum aliaj greke analizeblaj vortoj aperas kiel ne-analizeblaj. Anstataŭe oni devus klare distingi Esperantajn analizojn de grekaj analizoj kaj trakti ĉiujn grekajn analizojn same.

Ŝajnas ke tiuj, kiuj tre emas uzi la 15-an regulon por enkonduki novajn fakajn radikojn en Esperanton ofte ignoras la duan parton de la regulo: "ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton bazan kaj formi la ceterajn derivaĵojn el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo internacia". Do oni ne diru *prescienca* kaj *hemisfero*, sed

antaŭscienca kaj *duonsfero* (aŭ eĉ *duonglobo*).

Konklude, se oni uzas Esperanton fake, oni ne tro facil-anime enkonduku novajn fakajn radikojn, nur ĉar pluraj eŭropaj lingvoj uzas la saman fak-esprimon. Oni ankaŭ estu singarda pri vortoj jam troveblaj en vortaro: Nur ĉar faka vorto aperas en iu vortaro, tio tute ne signifas, ke ĝi estas enradikiĝinta. Ĉe nenradikiĝintaj radikoj, oni nepre pripensu, ĉu eblas esprimi la saman ideon per kombino de jam enradikiĝintaj Esperantaj elementoj, ekz-e anstataŭ diri *oftalmologio*, oni simple diru *okulscienco*. Oni ankaŭ ne hezitu uzi duvortajn ekvivalentojn, kiel *unuspecia kultivado* anstataŭ *monokulturo*. Ja estas neniua kialo, pro kiu oni devas esprimi certan ideon unuvorte, se estas multe pli elegante esprimi ĝin per pluraj vortoj; tradukistoj jam delonge scias, ke al unu vorto en certa lingvo ofte korespondas plurlingvaĵo en alia lingvo.

Se ne (aŭ nur treege peze) eblas esprimi ideon per tia kombinado, enkonduko de nova fak-radiko kompreneble estas necesa, kaj oni ne hezitu uzi iun sufiĉe internacie rekoneblan radikon, eĉ se la postuloj de la 15-a regulo ne estas tute plenumebaj (lastatempa ekzemplo estas la verbo *skani*).

Jam enradikiĝintaj radikoj kiel *biologio* aliflanke estas ĉiuokaze tute akcepteblaj; sisteme anstataŭigi tiajn radikojn per kunmetitaj vortoj (kiel *vivoscienco*) ja estus reformo, kiu tute forlasus la PIRON-an argumenton por skemismo surbaze de la real-lingva normo. (Kompreneble foja, laŭ-situacia, uzo de kunmetitaj alternativoj kiel *vivoscienco* estas ankaŭ tute akceptebla kiel parto de krea lingvouzo.)

Vortoj sen preciza unuvorta ekvivalento

Ĉar Esperanto estas ne-ĉefa lingvo de (preskaŭ) ĉiuj ĝiaj uzantoj, Esperantistoj ofte rimarkas, kiam ekzistas iu esprimo en ilia ĉefa lingvo, kiu ne havas precizan ekvivalenton en Esperanto. Ili tiam ofte emas enkonduki novan radikon en Esperanton por forigi tiun

⁹ paĝo 84 (BL)

"mankon". Sed ĉu vere temas pri manko?

Per ĉiu lingvo oni povas esprimi malsamajn aferojn. Ĉiam kiam oni komparas du lingvojn, oni trovas ke unu havas esprimojn ne precize tradukeblajn al la alia kaj inverse. Tio validas eĉ pli, se oni ĉiam volas traduki unu vorton per unu vorto anstataŭ uzi plurvortajn esprimojn. Simile, ankaŭ Esperanto havas esprimojn, kiujn ne eblas precize traduki al kelkaj aliaj lingvoj, ekz-e *malripozi*; kaj multegas la vortoj ne tradukeblaj unuvorte al multaj aliaj lingvoj, ekz-e *alprelegoto*, *elangligi* aŭ *samŝancige*. Homoj ne kutimas enkonduki novajn vortojn al sia denaska lingvo se ili ekscias pri fremdlingva vorto, kiu ne estas precize tradukebla al ilia lingvo, ĉar ili bone scias ke oni ankaŭ sukcesas esprimi siajn ideojn per la jam havebla materialo de la lingvo. En Esperanto tamen ofte aperas tiaj proponoj pri novaj vortoj. Pere de PIV aparte disvastiĝis vortoj por traduki antaŭe ne tradukeblajn francajn vortojn, ekz-e *timida* kaj *langvoro*, ĉar kaj la malnova kaj la nova PIV havis francojn kiel ĉefredaktistojn kaj multajn francajn kunlaborantojn. Tamen tiuj vortoj ne vere enradikiĝis en Esperanton.

Krom la oftan tradukon *timema*, PIRON prezentis multajn alternativajn tradukojn por la franca vorto *timide*, interalie *singĝenema*, *malaplomba*, *ruĝiĝema*, *hontema*. Kelkaj certe argumentus, ke neniu el tiuj vortoj estas preciza traduko de la franca *timide*. Al tia argumentado PIRON tre lerte respondas: "Aserti, ke ĉar esperanto ne havas unu vorton, kiu kovras la saman grupon, ĝi estas malriĉa, egalus deklari, ke la malnovgreka ne estas riĉa, ĉar ĝi ne havas **unu** vorton por nia sentogrupo "ami", aŭ la angla, ĉar mankas al ĝi **unu** vorto por la diversaj manieroj laŭtvoki, kiun ni nomas *krii*, aŭ la ĉina, ĉar ĝi ne povas **unuvorte** esprimi nian koncepton "onklo", aŭ la franca, ĉar ĝi havas vortojn por "krajono", "plumo", "kreto", sed nenion samsencan al nia pli ĝenerala skribilo". La grava afero kiun oni atentu do estas ke la signif-ampleksoj de la vortoj de unu lingvo estas io konvencia:

Malsamaj lingvoj ebligas esprimi konceptojn kun malsamaj signif-ampleksoj. La grava afero nur estas, ke estu sufiĉe da esprim-eblecoj por ke oni povu elturniĝi en ĉiuspecaj situacioj, kaj tio certe eblas per la riĉa reallingva Esperanto. En la kazo de la vorto *langvoro* PIRON montras plurajn alternativajn tradukojn de certa franca poemo de VERLAINE, kiu uzas la francan vorton *langueur*, kaj kiun KALOCSAY tradukis uzante la novradikon *langvoro*. Liaj tradukoj redonas la esencon de la originalo kaj elvokas ĉe la legantoj la samajn emociojn kiel la originalo, sen ke li bezonis uzi la vorton *langvoro*. La fakto ke *langvoro* estas apenaŭ uzata en Esperanto (kaj kiam KALOCSAY uzis ĝin por tiu traduko eble neniam antaŭe uzita) eĉ signifas, ke la traduko de KALOCSAY ne elvokas la samajn emociojn ĉe la plej multaj esperantistoj, ĉar tiuj devus unue kontroli la signifon de la vorto en vortaro aŭ glosaro.

PIRON ilustras sian ideon per la jena ekzemplo:

*Gloru l' Eternulon: li bonas,
senfinas lia ĥesdo.*

Ĉu vi sentas, ke tio estas Esperanto? Ĉu ĝi elvokas emociojn ĉe vi? Nu bone, vi renkontas la vorton unuafoje kaj serĉos ĝin en vortaro (aŭ glosaro). Imagu ke vi trovas jenan difinon: **ĥesdo** – *eco de animo karakterizita per la deziro, ke la aliulo(j) disvolviĝu bone laŭ sia esenco, sentu sin plej bone en etoso de respekteco; inklino donaci malavare; emo akcepti, pardoni; deziro favori iun; bonkoreco*. Ĉu leginte tiun difinon, vi vibras kun la antikva hebrea versisto, kiu lirike esprimis entuziasmon pri sia Dio?

Estas plej dubinde. La aserto ke tiu traduko fidelas estus trompa, ĉar tute ne temas pri traduko ĉi-kaze. Se alikaze la versoj tekstas

*Gloru l' Eternulon: li bonas,
senfinas lia amo.*

vi povas senti la emociojn de la versisto, eĉ se la lasta vorto ne tute fidele redonas la sencon

de la netradukebla hebrea vorto *ĥesed*. Fideleco en la dua kazo ekzistas, kvankam ne perfekta; en la unua kazo estas nur ŝajnfideleco.

Tute samsignifaj anstataŭigoj

Simile al la ĵus pritraktitaj novradikoj, ankaŭ la novradikoj kiuj tute samsignifas al jam ekzistantaj vortoj estas aparte ŝatataj de verkistoj, precipe de versistoj.

Al ĉi tiu grupo de novradikoj apartenas ĉefe la novradikoj, kiuj anstataŭigas A-vortojn kun la prefikso *mal-*, ekz-e *difacila* (=malfacila), *olda* (=maljuna), *kurta* (=mallonga) kaj *mava* (=malbona). En neniu alia lingvo verkisto enkondukus novajn vortojn por tiel bazaj ideoj, por kiuj ja jam ekzistas tute kutimaj esprimoj. Do kial esperantaj verkistoj enkondukis tiajn vortojn?

Laŭ la antaŭparolo al la Parnasa Gvidlibro, la verso

La tago malvarma, malgaja, sensuna...

de Grabowski taŭgas "por doni la impreson de sunplena somertago, ĉar tian bildon la tri *mal* aŭ *sen* neas ja intelekto, sed ne malaperigas el la sens-imago". Mi povas nur aliĝi al la opinio de PIRON, ke nur persono ne sentanta Esperanton, kia ĝin sentas la plejmulto de la ordinara uzantoj, povas tion skribi. Sed tamen tiu stranga pensmaniero certe influis plurajn versistojn esperantistajn. Tamen aliaj eble uzis la alternativojn sen *mal* nur pro ilia mallongeco, aŭ ĉar la nombro de silaboj pli taŭgis en certa verso ol tiu de la kutima vorto.

Aldone al la *mal-mal*-vortoj, ekzistas ankaŭ aliaj vortoj tute samsignifaj al jam ekzistantaj vortoj, kiel *primavero* (=printempo) kaj *taŭro* (=virbovo).

La samsignifaj anstataŭigoj eĉ malpli sukcesas enradikiĝi en la realan lingvouzon ol la similsignifaj anstataŭigoj antaŭe priparolataj. Certe ekzistas kelkaj esceptoj: la plej sukcesa anstataŭigo verŝajne estas *pigra*

(=maldiligenta, mallaborema), kiu eble estas la sola, kiu nun estas uzata pli ol la ekvivalentaj tradiciaj esprimoj; ankaŭ foje uzata estas *trista* (=malgaja, malĝoja); pli malofte oni aŭdas *olda* (=maljuna); interesa kazo estas *frida* (=malvarma), apenaŭ uzata memstare ekster la literaturo, sed tamen kutime uzata por la kunmetaĵo *fridujo* (kiun oni tutcerte ankaŭ povas nomi *malvarmujo*). Tamen kompare al la grandega nombro de proponitaj anstataŭigoj, tiuj kiuj iom enradikiĝis estas vere malmultaj.

Literatura lingvaĵo

Ĉar la novradikoj kiuj anstataŭigas samsignifajn kaj ankaŭ la novradikoj sen precizaj samsignifaĵoj estas aparte ŝatataj de literaturistoj, ni ĉi-rilate ankaŭ atentu kion PIRON diris pri la literatura lingvaĵo. Pri la temo li havas tutan ĉapitron sub la titolo *Bona lingvo literatura*. Unu grava mesaĝo de la ĉapitro estas ke oni identigas sin al sia lingvo, kaj ke tial homo, kiu legas *sian* Esperanton, en formo pli arta, sed ne pli komplika, ol li povas uzi ĝin, sentas sin portata supren.¹⁰ Kompreneble oni ne neu ke komencantoj kaj komencintoj povas uzi esperantan literaturon por praktiki siajn lingvokonajn, kaj por ili ĉiuokaze estos vortoj ne kompreneblaj sen helpo de vortaro; sed spertaj esperantistoj ne bezonu uzi vortaron por kompreni nian literaturon; ili sentu la artecon de *sia* Esperanto anstataŭ daŭre senti ke al ili mankas ankoraŭ scio (neniam plene akirebla ĉar la literaturistoj daŭre inventadas novajn radikojn).

Aparte grava por nia temo estas lia aserto ke "estas iluzio imagi ke estetika efiko rezultas en esperanto el estetika efiko de la koncerna radiko en la fontolingvo".¹¹ Mi ankaŭ konsentas kun PIRON ke la novradik-plenaj literaturaĵoj povas kaŭzi elreviĝon ĉe esperantistoj, kiuj povas pensi: "mi lernis lingvon tute taŭgan por literaturo, sed jen denove libro en alia dialekto. Oni trompas

¹⁰ paĝo 102-103 (BL)

¹¹ paĝo 91 (BL)

min!"¹² Kaj rilate al la jam menciita vorto "langvoro" enkondukita ĉar mankis preciza ekvivalento por la franca "langueur", li atentigas pri alilingvaj vortoj, por kiuj laŭ la sama logiko ankaŭ necesus novradikoj: la rusa *tosko* ($\approx$ sopiro, melankolio, angoro), la portugala *saudade* kaj la angla *gloom*. Al kia kaoso irus nia lingvo se ĝi akceptus novradikojn por havi precizajn ekvivalentojn al ĉiuj tiuspecaj vortoj el ĉiuj lingvoj? (Kaj kial preferi la francan al la aliaj lingvoj?)

Komence de la ĉapitro PIRON revas pri "estonta verkisto", kiu "plene rezignos pri la novformoj, kiuj ne eniris la parolan esperanton, ĉar la beleco de lia stilo baziĝos sur plena ekspluato de la esprim-ebloj, kies riĉecon konstante rivelas la formoj spontanaj ŝprucantaj, kiam esperantistoj komunikas inter si."¹³ Legante tion mi tuj ekpensis ke intertempe ja aperis konata verkisto kun tiaj ecoj: Anna LÖWENSTEIN. Mi esperas ke tiaj verkistoj multiĝos kaj riĉigos nian literaturon.

Jam plene enradikiĝintaj novradikoj

Ĉio dirita ĝis nun tamen ne kritikis la jam plene enradikiĝintajn novradikojn, kiel *mesaĝo*, *pluraj*, *humuro* kaj *baletto*. Se oni kiel PIRON konsideras la realan lingvon sia normo, oni tute ne sentas bezonon kritiki tiujn novradikojn.

Certe iuj emus kritiki la PIRON-an koncepton de *reala lingvo*: Ĉu ne la literatura lingvo apartenas al la reala lingvo, kaj tial radikoj uzataj en ĝi estas reallingvaj? Oni devas ĉi-kaze distingi uzon kaj enradikiĝon de novradiko. Nur ĉar iuj uzas vorton aŭ radikon, ĝi ankoraŭ ne enradikiĝis en la lingvon. Por diri ke certa esprimmaniero enradikiĝis, ĝi devas esti sufiĉe ofte uzata de diversaj uzantoj; ĝi devas esti uzata en menciinda proporcio de la situacioj, en kiu ĝi povus esti uzata – se ĝia uzo estas maloftega kompare kun iu alternativa esprimmaniero, ĝi ne vere enradikiĝis.

Kaj kiam oni konsideras ĉu novradiko estas enradikiĝinta, oni devas tiel konsideri la tutan lingvouzon, el kiu la literatura estas nur malgranda parto. Ĉar ekster la literaturo novradikoj estas uzataj eĉ malpli ol en la literaturo, oni tiel pli ofte venas al la konkludo ke certa novradiko estas ne-enradikiĝinta ol se oni nur konsiderus la literaturan lingvon.

Listo de simplaj samsignifaj vortoj

La Esperantaj vortaroj ofte mencias multajn tute ne enradikiĝintajn novradikojn sen atentigo pri tio, ke ekzistas manieroj esprimi la ideon per kunmetaĵoj. Tio malfaciligas la vivon al uzantoj, kiuj emas uzi malpli da novradikoj.

Ekde la fino de 2006 ekzistas nova projekto por helpi al la skemismaj lingvo-uzantoj. Temas pri la listo de simplaj samsignifaj vortoj, kiu ĉefe mencias kunmetitajn alternativojn al novradikoj.¹⁴ Oni atentigu pri tio, ke la listo uzas la du simbolojn "-->" kaj "=" kun malsamaj signifoj: Kiam post esprimo aperas "-->", tio signifas ke la listo malrekomendas tiun esprimon, kaj rekomendas anstataŭigi ĝin per la alternativoj menciitaj post tiu simbolo (ekz-e ĉe "rinoplastio --> naz-operacio"). Kiam aperas "=", la listo ne malrekomendas la listigitan esprimon, sed nur mencias alternativojn por subteni la kreon lingvouzon (ekz-e ĉe "atlaso = maparo").

Pri la enhavo de la listo oni diskutas en dissendolisto, al kiu ĉiu povas aliĝi.¹⁵ La listo estas praktika ilo por subteni skemismon. Oni ne miskomprenu ĝin. Certe la kreantoj de la listo ne opinias, ke oni povas tuj anstataŭigi ĉiujn novradikojn listigitajn per "-->". Ili certe plu-ekzistos paralele al la kunmetaĵoj (kvankam la plej multaj el ili ĉiuokaze tute ne estas enradikiĝintaj, sed nur uzataj de malmultaj unuopuloj). Sed por kontraŭpezi la al-novradikan influon de niaj vortaroj (precipe

¹² paĝo 92 (BL)

¹³ paĝo 88 (BL)

¹⁴ www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj_samsignifaj_vortoj

¹⁵ groups.google.com/group/la-bona-lingvo

PIV), ĝi provas montri al la esperantistoj la vastajn eblojn de kunmetado, por influi ilin favore al skemismo. Certe indas rigardi la liston, por ekscii kiujn ne-necesajn nov-radikojn oni foje uzas malfaciligante tiel eble

la komunikadon (precipe kiam oni komunikas kun Esperantisto kiu ne venas el la Okcidenta kultursfero).

Marcos CRAMER (Germanio)

Kurso de la hispana lingvo kaj kulturo en Hispanio

Studi certan lingvon en la respektiva lando estas ĉiam interese kaj plezure, ĉar vi akiras ne nur lingvoposedon, sed ankaŭ multegon da novaj impresoj, geamikoj kaj sperton pri antaŭe nekonata vivstilo, kulturo kaj eĉ pensmaniero.

Ĉi-somere, dank' al TEJO kaj la Konsilio de Eŭropo, ankaŭ mi bonŝancis partopreni bonegan programon de lingvo kaj kulturo por gejunuloj en Mollina (Malaga), Hispanio.

La kurso estis organizata kaj plene financita de la hispana Instituto de Junularo ĉe la Ministerio de Laboro kaj Sociaj Aferoj, kiu havas multajn similajn programojn, direktitajn al la interkultura edukado, instruado de laboro en junularaj organizoj, edukado al toleremo kaj disvolvo de krea potencialo de gejunuloj. Partoprenis 49 geknaboj el 18 landoj: Italio, Portugalio, Germanio, Belgio, Svislando, Finnlando, Grekio, Kroatio, Bulgario, Slovakio, Slovenio, Ĉeĥio, Hungario, Litovio, Rusio, Israelo, kaj eĉ Koreio kaj Brazilo.

La kurso daŭris tri semajnojn, kaj ĉi tiu tempo sufiĉis eĉ por nul-komencantoj por eki paroli pli malpli libere kaj flue, ĉar ne nur la studado, sed la tuta vivo en la bazejo estis organizata ĉirkaŭ la ideo stimuli la partoprenantojn uzi la hispanan lingvon en diversaj situacioj kaj ne ĝeni sin, se oni ne scias iun vorton aŭ esprimon – la etoso de la kurso estis tiom bona kaj helpema, ke post kelkaj tagoj vi forgesas, ke vi ne scipovas la lingvon, kaj komencas simple komuniki kun la aliaj partoprenantoj kaj eĉ ne rimarkas ke oni parolas en la hispana ☺.

Ĉirilate mi estis bonŝanca duoble, ĉar mia posedo de esperanto helpis multege - kaj kompreni, kaj esprimi miajn pensojn, sed, de

alia flanko, ĉi tiuj lingvoj estas tiom similaj, ke foje estis tre malfacile ne miksi vortojn kaj idiomatojn.

Certe, ankaŭ 3 horoj de lingva studado kaj praktiko en malgranda grupo kun sperta instruisto estis ege utila, des pli ke la metodoj de instruado estis tre komunikadaj kaj ne-kutimaj, ekzemple por praktiki imperativon ni ekpensis kaj esprimis konsilojn por aliaj homoj tute ne atendantaj tion. La kulturo de Hispanio estis aparta leciono, ankaŭ lernita ĉiutage, en kio ni enriĉiĝis per informo pri geografio, historio, ĉefurboj, muziko, arto, socio kaj junularo de Hispanio, pri sia problemoj de migrado, maltolereco kaj multaj aliaj aferoj. Ĉiunokte oni al ni montris bonegajn filmojn de famaj hispanaj reĝisoroj, kiuj ankaŭ respegulis la hispanan historion, socion kaj kulturon kaj, krom tio, plibonigis nian eblecon kompreni viglan parolmanieron.


Apartan dankon mi ŝatus esprimi pro niaj ekskursoj, ankaŭ organizitaj kaj financitaj de la hispana flanko – al Sevilia, Kordoba, Granada, Antequera kaj Malaga. Dank' al ili ni ne nur eksciis pli pri la hispana historio kaj kulturo, sed ankaŭ havis eblecon senti sin kiel atestantoj de nekredebla mikso de katolikismo kaj islamismo en la sudo de ĉi tiu bonega lando.



“Ĉiuj malsamaj, ĉiuj samrajtaj”

Krom lingvo kaj kulturo la kurso akcentis ankaŭ je aspektoj de laboro en junularaj organizoj. Ĉiutage ni partoprenis Forumon de Junularo – diverssteman, gvidatan de estinta kurspartoprenantino Gabriela CIVICO. Ni pri-diskutis aktualajn problemojn de nuntempa socio – tolereco kaj rasismo, enmigraĵo kaj problemoj de adaptado, ekologiaj problemoj kaj solvoj, kaj kion la junularo povas fari por plibonigi la mondon tiurilate; ni eksciis pri laboro kaj projektoj de lokaj kaj naciaj junularaj organizoj de Hispanio, multe ludis kaj praktikumis, faris rondajn tablojn, ekzercojn, cerbajn sturmojn, pridiskutis kaj praktikis ellabori socigravajn projektojn kiel “Ĉiuj malsamaj, ĉiuj samrajtaj”. Persone min ravis la fakto, ke en Hispanio pli ol 55% da gejunuloj estas membroj de iuj organizoj kaj sukcese laboras por la socio – tio, laŭ mi, estas bonega atingo de landestraro.

Enkadre de la Forumo ni ankaŭ interŝanĝis sperton pri la agado en niaj junularaj organizoj, ĉar ĉi tiun kurson rajtas partopreni nur aktivaj gejunuloj, efektive laborantaj por socio en siaj landoj. Tial ĉiu partoprenanto povis lernigi aliajn. Ni faris prezentojn de niaj organizoj, rakontis pri aranĝoj – ĉi tiu interŝanĝo estis ege utila. Mi fakte faris du



prezentojn pri TEJO – unuan kiel mur-aŭŝon (vidu la fotojn) kaj la duan kiel komputilan projekci-prezenton kun montrilo kaj klarigo (vidu la fotojn). Dum la dua oni tre interesiĝis pri Esperanto kiel lingvo tre facila kaj precipe pri Pasporta Servo kiel bonega ebleco vojaĝi kaj gastigi esperantistojn de diversaj nacioj. Mia ekzemplo de pasportserva vojaĝo inspiris multajn ☺. Evidentiĝis, ke unu knabino de Slovakio jam komencis studi Esperanton en sia urbo, sed ne konis nek Esperanto-organizaĵojn, nek esperantistojn de sia lando, kun kiuj ŝi povus praktiki kaj amikiĝi. La libreto de Pasporta Servo helpis nin ankaŭ en ĉi situacio – ni facile kontentigis ŝian intereson.

Generale mi ŝatus danki TEJO-n pro la ebleco partopreni, kaj esprimi grandegan dankon kaj admiron al hispana Instituto de Junularo por kursorganizado – ĉio estis farita tre profesinivele kaj kun neforgesebla



bonkoreco al partoprenantoj. Nin dolorigis lasi la bonan bazejon kaj bonegan etoson de la kurso, niajn instruistojn, novajn geamikojn kaj belan naturon, eĉ la manĝaĵon tipan de ĉi

tiu mirakla kaj gastema lando – Hispanio...

Olja IVANNIKOVA

Kore – muziko el la profundo de la koro...

La ĉefkantisto de la bando – la franco Kris SPITĜER – ekkonis Esperanton en 1997 kaj post tri jaroj en 2000 eldonis la unuan lumdiskon de sia nova muzikgrupo Kore kun la titolo „Kia viv“¹. Post koncertoj en diversaj festivaloj Kris dum certa tempo laboris sole. Feliĉe li renkontis la gitariston Francois Tijou (kies kromnomo estas Fiks) kaj kreis kun li kaj lia amiko David HADJADJ novan Kore – triope en studio kaj kun tri aliaj muzikistoj sur scenejo. Finfine en 2007 aperis la dua albumo de la bando sub la titolo „Tielas viv“². Ambaŭ albumoj montras la vastan spektron de stiloj kaj kreopovon de la bando kaj entenas multajn mempriskribajn tekstojn, kiuj rankontas al ni pri la vivo de bando sed donas ankaŭ kompareblecon al niaj vivaj okazaĵoj.

Povas esti ke vi jam legis recenzon de „Tielas vivo“ en la antaŭpasinta numero de Kontakto fare de Paŭlo Moĵaev (Nr. 220, 2007:4, p. 14). Tie la aŭtoro sufiĉe multe komparas la nunan duan lumdiskon de Kore kun la unua sub la titolo „Kia viv“³, kaj oni povas facile rimarki, ke li bedaŭras, ke la dua lumdisko ne estas en la sama stilo kaj ne havas „vere belaj[n] melodioj[n]“⁴ kiel la unua. „La ŝanĝo, miaopinie, ne pasis tute senperde – la muzikaĵoj perdis multe da melodieco kaj individueco, tiel karakterizaj por la antaŭa albumo.“⁵

Mia deziro nun estas montri al vi, kara leganto, la lumdiskon de Kore kiel ĝi estas mem, sen la konstanta komparo kun la „antaŭulo“. Kompreneble eble ne ekzistas perfektaj kantoj jam pro la fakto, ke ĉiu havas

sian guston kaj perspektivon en la muziko kaj en ĉiuj aliaj sferoj.

Mia recenzo estos ankaŭ subjektiva, sed en pli pozitiva tono ol la artikolo en Kontakto.

La dua albumo de Kore konsistas el du partoj. La unua parto povus entuziasmigi ĉiujn amantojn de kantoj pri la amo, la vivo, la paco, la toleremo, la eterneco kaj pluvivo eĉ post la morto pri kiuj rakontas la titoloj „Nova ŝanco“, „Karulino“, „Laŭ mi“, „Promeso via“, „La festo“, „Muzik“, „Pro mi“, „Stelo“, „Tielas vivo“, „Ni kuŝas ĉe ni“, „Mi brilu plu“ ĉiuj en melodia kaj ĵaza stilo. Ĉiuj kantoj estas de la jaro 2007.

La dua parto plaĉus al amantoj de roka stilo kaj pli pezaj enhavoj kun titoloj kiel: „Bonan vojaĝon“, „Pro lucifer“, „Drag queen“, „Jen



la provoso“, „Nova viv“ kaj „Spegulo“. Ĉiuj kantoj de la dua parto de la albumo esits kreitaj en 2000 kaj prezentas malnovajn titolojn de Kore.

Mi ŝatus koncentriĝi pri la titolo „Mi brilu plu“, kiu estas la fina kanto de la unua parto.

“Mi brilu plu” estas la esperanta adapto fare de Roel Haveman de la tre fama kanto de la roka brita muzikgupo „Queen“, kiu aperis kiel la 12a kaj la lasta kanto sur la albumo “Innuendo” en 1991 sub la titolo “The Show Must Go On”. La albumo aperis je la 14a de oktobro en 1991 nur 6 semajnojn antaŭ la morto de la ĉefkantisto de la bando Freddie MERCURY (origine Farrokh BULSARA). En Novembro 1991 la kanto “The Show Must Go On” atingis la rangon 16 en la brita furorlisto de la tiama tempo.

Grava atingo de Kore en la realigo de “Mi brilu plu” estas la tre bona metafora kanton-teksto kiu esprimas sammaniere la pensojn kaj konvinkon de Freddie Mercury pri la neceso plu kanti kaj verki malgraŭ la malsano (aidoso), kiu suferigis lin ekde la finaj 80-aj jaroj. Ĝis la lasta tago antaŭ sia morto li neis sian malsanon, pri kiu speciale dum 1991 konjektis multaj ĵurnalistoj. Je la 24a de

novembro li mortis en Kensington pro pulminflamo kiun kaŭzis la aidoso.

“Mi brilu plu” same kiel “The Show Must Go On” estas tre emocia, fortoplana kaj majesta kanto. Ĝi montras la malfeliĉon pri la baldaŭa fino de la vivo, sopiron al la libero sed ankaŭ la grandan forton de la kantisto venki la tragedion kaj plu vivi en siaj kantoj, pluvivi en sia muziko kaj en la muziko de la muzikgrupo. “La prezento devas pluiri” estis tre interese kaj trafe tradukita per “Mi brilu plu”. Nun la fokuso estas sur la kantisto mem sed esprimas la saman batalon kun la morto eĉ pli direkte ol en “The Show Must Go On”. Nuntempe kantoj de Queen daŭre restas tre popularaj kiel en la vivtempo de Mercury. Li brilas, li famas plu kaj fascinas nunajn aŭskultantojn. La kanto kondukas al la ripenso pri la sia propra vivo kaj pri la vivo entute, kio estas nia granda trezoro.

Mi do tre rekomendas la novan albumon de Kore “Tielas viv”, kiu estas tre inda pro la vario de muziko kaj la enhavo, kaj deziras al ĉiuj bonan aŭskultadon kaj multan plezuron kun la nova lumdisko.

Ulĵana CRAMER, Germanio

Du diskoj de Persone estas senkoste haveblaj

Du albumoj de la fama muzik-grupo Persone estas senkoste elŝuteblaj ĉe la retejo bertilow.com/persone. Ne-komerca kaj senprofita kopiado kaj disvastigado estas tute permesataj.

En la spegulo estas la dua albumo de Persone. Ĝi estis eldonita kiel kasedo en 1991. Tiam Persone jam konsistis el la nunaj tri membroj: Martin, Anders kaj Bertilo. Persone mem reldonis la albumon kiel lumdiskon, kun multe pli bona sono ol la origina kasedo.

Povus esti simple estas la tria albumo de Persone. Ĝi estis eldonita en 1996 kiel lumdisko. Ĝi enhavas 13 pecojn inkluzive unu akustikan kanton: “Nun mallumas ekstere”.

Kaj “En la spegulo” kaj “Povus esti simple” estas jam delonge elĉerpitaj, sed ambaŭ estas nun elŝuteblaj senkoste kiel torento (per pro-

gramo kiel BitTorrent k.s.) La torento enhavas la tutan albumon kiel wav-dosierojn, tial la elŝutaĵo estas tre granda, sed kompanse la sonkvalito estas la sama kiel en la lumdisko mem.

Rimarku, ke la torento-elŝuto estas ankoraŭ iom eksperimenta. Estu do pacienca.

La du albumoj estas elŝuteblaj ankaŭ kiel MP3-torentoj kun bona kvalito, sed signifne malpli granda dosiera amplekso:

<http://thepiratebay.org/tor/3820236>

<http://thepiratebay.org/tor/3820298>

La aliaj albumoj de Persone (62 minutoj, *Sed estas ne, Sen*) daŭre estas akireblaj ĉe la eldonejo kaj muzika retvendejo Vinilkosmo (www.vinilkosmo.com).

Laŭ s.c.e. kaj bertilow.com/persone, pere de Ret-Info